Somero 2014 Esperanto-Societo Kebekia Jaro 29, No 116

# La Riverego


MeKaRo-2014 en Ŝerbruko 2
Biografia filmo pri Johano Sorel 6
Japanaj aventuroj : Ŝimonoseki 8
Lingvo kaj egaleco 18
La Idoj de la Suno 22
Acersiropa inico en Tririvero 37
Esperanto-aranĝoj 38
Kolofono 39





## Kun amikoj en Ŝerbruko

## *Avec des amis à Sherbrooke*

Surmura pentraĵo en la stilo *trompe l'œil* (okul-trompo) en Ŝerbruko : oni ne povas distingi, kie veraj ŝtonoj finiĝas kaj kie la pentraĵo komenciĝas. En Ŝerbruko estas ĉ. trideko da surmuraj pentraĵoj en tiu stilo (fotis Ĵ. Amis)

# MeKaRo 2014 en Ŝerbruko – sukcesego!

*Nicolas Viau*

*Un petit retour sur le MeKaRo (rencontre espérantophone du Canada central), qui a lieu en mai chaque année, cette fois-ci à Sherbrooke. L'événement, à sa onzième édition, se révèle être une réussite de bon augure pour l'avenir de cette « tradition » récente !*

**Ekde la 17-a ĝis la 19-a de majo okazis la 11-a MeKaRo (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto) en Ŝerbruko. MeKaRo ja daŭre montriĝis populara kaj ŝatata de sia partoprenantaro renkontiĝo. Tio estis bona okazaĵo por ĉiuj partoprenantoj malkovri Ŝerbrukon kaj la Orientajn Kantonojn. Multe helpis nin bela vetero sabate kaj dimanĉe ! Kutimaj partoprenantoj ja, kompreneble, ĉeestis, sed ankaŭ pli freŝdataj esperantisitoj venis, montrante, ke Esperantio daŭre vivas en nia regiono ! Laŭ la organizantoj, 39 personoj partoprenis ĉi-foje.**



Mekaranoj apud malnova prizono

## Alia urbo, alia universitato

Ĉi-jare, la gastejo estis la Univesitato Bishop's en Lennoxville (antaŭa aparta urbo, kiu fariĝis parto de Ŝerbruko en la jaro 2002), kiu posedas komfortajn studentajn loĝejojn meze de bela kampuso. La gastejaj servoj de la universitato ankaŭ ofertas la matenmanĝon en konstruaĵo tute apude. Ege agrabla !

## Blue kaj verde

Dum la unua tago, la grupo promenadis ĉirkaŭ la blua Lago de la Nacioj kaj en la bela parko

Jacques-Cartier. Poste ni daŭrigis marŝi ĝis la Gorĝo de la rivero Magog kaj la akvoelektrejo Frontenac, la plej malnova daŭre funkcianta en Kebekio.

Tiu tago, fakte, eble estis unu el la unuaj veraj tagoj de ege malfrua printempo ĉi-jare. La naturo ĵus ekverdiĝis, kaj la suno brilis. Ni nun finfine povas plendi pri la tro varma vetero, post monatoj plendante pri la vintro !


Sub la lerta gvidado de la Sapomajstro, ni penetris la misterojn de sapofarado

La vespermanĝon ni pasigis en vjetnama restoracio, kie preskaŭ tuta etaĝo estis rezervita por nia grupo. Tio estis bona okazaĵo por ĉiuj iom pli longe babili kun malnovaj amikoj aŭ ankoraŭ interkonatiĝi.

## Pure... sed nur nature !

La tago komenciĝis sabate per vizito al la metia sapofarejo *Savon des Cantons*, kies estro klarigis, kiel fabrikiĝas tradicia Marsejla sapo, uzante olivoleon kaj kelkajn aliajn ingrediencojn. Lia prelego (franclingva, anglolingva kaj eĉ — iomete — Esperantlingva), fakte, ege interesis la partoprenantaron. La prezentanto humure proklamis, ke lia metio simple estas « lavi la homaron » — sed nur per sapo el natura deveno, kompreneble... Post vigla kaj bonetosa klarigado, multe da — nun konvinkitaj — homoj eĉ aĉetis donacetojn en la butiko aŭ ankaŭ ion por si mem ! Tiu vizito, verŝajne, montriĝis bona surprizo por la plejparto.



## Atentu pri Wippi !

Post manĝo aŭ en eta restoracio apud *Savon des Cantons*, aŭ en restoracio Saint-Hubert (certe grava sperto por nekebekianoj !), la grupo rekuniĝis en la bela urbeto North Hatley, apud

bela lago, Massawippi. Ĉu vi scias, ke, laŭdire, ankaŭ en tiu lago vivas monstro, nomata Wippi ? Ĉu, eble, parenco de Nessie en Skotlando ? Ni, bedaŭrinde, verŝjane neniam scios… sed atentu, se vi naĝas en la lago !

Aliaj — pruvitaj — vidindaĵoj de North Hatley estas ankaŭ ĝiaj stratetoj kaj multaj antikvaĵbutikoj, kiuj, ŝajne, havis fortan allogan povon je kelkaj partoprenantoj !

## De Japanio al Ŝerbruko

Ĵenja kaj Joel Amis prelegis sabate kaj dimanĉe vespere (laŭ tiu ordo) pri sia restado en Japanio fine de la pasinta jaro. Ĵenja speciale parolis sabate pri japanaj kutimoj kaj socio, kaj prezentis ties vidon kaj ideojn pri okcidentaj kutimoj.

La sekvantan vesperon Joel parolis pri alia aspekto de la vojaĝo : sia intereso pri la studo de religioj kaj, pli specife, pri sia magistra studtemo tie, la nova japana religio Oomoto. Ĝi estas ŝintodevena religio fondita fine de la 19-a jarcento, kiu enhavas kaj nacispecifajn kaj universalismajn ecojn. Alia interesaĵo por li nature estas ĝia uzo kaj subteno de Esperanto por eksteraj rilatoj kun aliaj popoloj, trajto, kiu faciligis la komunikadon. La prelego ankaŭ instigis vivan interparoladon pri la rilatoj inter Esperantistoj kaj aliaj movadoj. Kvankam ne estis interkonsento, intereso, ŝajne, ne mankis ! Kaj ĉu tio ne pleje gravas ?

## Estinta kaj estanta Tero

Dum la lasta tago estis pluvo. Ni do devis ŝanĝi niajn antaŭajn eksterajn ekskursajn planojn (viziti la parkon de la Bieno Howard) kaj preferis ŝirmiĝi ene de konstruaĵo : ni do iris al la Muzeo pri naturo kaj scienco, kie estas klarigita kaj la historio de la Tero kaj la regiono (inkluzive per interaga filmo) kaj de la biosfero kaj vivaĵaro. Oni ankaŭ havis la eblon sperti la vibrojn provokitajn de diversfortaj tertremoj ĝis kvazaŭ 9 sur la skalo de Richter en speciala skatolego. Interesa, sed timigega !

Tuj poste venis la lasta tagmanĝo en maroka-libana restoracio kaj la kompreneblaj adiaŭoj. Sed, feliĉe, estos aliaj okazoj kaj renkontiĝoj !

## Ek al Toronto !

Dankegon do al la organiza teamo en Ŝerbruko pro sukcesa kaj agrabla renkontiĝo ! Kaj ni deziru bonan ŝancon al niaj Torontaj geamikoj por organizi la postan MeKaRon, tiel daŭrigante la tradicion de printempa renkontiĝo en nia parto de Nord-Aameriko ! Espereble, multaj partoprenos ĝin !

# Iri al Ŝerbruko !

## *Minjo Renaud*

Esperantaj renkontiĝoj estas kunligitaj kun plezuro :

- malkovri lokojn,
- renkonti homojn,
- ekzerci sian lingvokapablon.

Tio estas finfine amika festivalo.



Minjo (meze) dum la prelego en sapofarejo

La unuan tagon, ni promenis sur la bordo de la Lago de la Nacioj *(Lac des Nations),* laŭlonge de la rivero Magog, ni spertis kvazaŭ kapturnon transirante la tumultan riveron, kaj ni endormiĝis kun la kanto de la ranoj.

La sekvantan tagon, en la sapofarejo ni profitis de vigla prezentaĵo en parfuma atmosfero, kaj poste vagis ĉe la lago Massawipi, en ĉarma North Hatley de Ali-Baba-brokantejo ĝis la eta plaĝo, kiun ni reinventis en nia printempo malfrua. La ebleco laŭiri alian vojon por malkovri alian aspekton de la regiono estis tre agrabla.

Dum la distra vespero gvidata de Jed, mi povis, unuafoje en Esperanta kunveno, kompreni preskaŭ la tutan sinsekvon de la proponata ludo. Kelkaj el ni fariĝis kaŝaj Idistoj, aliaj honestaj Esperantistoj, kaj kelkaj aliaj iĝis akademianoj. Jed diris : « Vi povas senĝene defendi mensogon. Vi povas defendi eraron kun certeco. » Finfine vi povas, vi devas ludi. Tiu estis mia kompreno. Tiel, en granda rondo, ni kune travivis sub la direktado de Jed kaj Jakobo intensan vesperon.

Kaj denove kun la ranoj ni enlitiĝis, kaj matene kun la korvoj ellitiĝis.

Lastan tagon, post la matenmanĝo, mi devis foriri. Tra la vojo de la rivero de la Ĉerizoj, la buso veturis de la ĉirkaŭurbo de Ŝerbruko ĝis Montrealo, kie granda ŝildo kaptis miajn okulojn : « Daŭrigu vian kreskon ĉi tie. » Tio dum momento pensigis min.

La tuta semajnfino koncentriĝis je lokoj kaj homoj, estis dialogo inter pasinteco kaj nuno en bona humoro laŭ la Esperanto kutimo. Niaj gastigantoj plej amike akceptis nin, ili faciligis tion, kion Albert Jacquard esprimis ĉi tiel : « La vera aktiveco de la homo estas konstrui sin mem, renkontante aliajn. »

Multan dankon ! Ni revenos al Ŝerbruko.

Biografia filmo pri Johano Sorel :

# De Ĵakmel al Montrealo, escepta vojiro en mallumo

*Zdravka Metz*

*Le 6 avril à Montréal était projeté le film de Roger Boisrond intitulé « Jean Sorel: de Jacmel à Montréal, un exceptionnel parcours dans le noir. »*

**La 6-an de aprilo en Montrealo estis prezentita filmo de Roger Boisrond titolita « De Ĵakmel al Montrealo, escepta vojiro en mallumo ».**

La filmo biografia, kie Johano mem rakontas : pri sia handikapo, denaska blindeco ; pri sia patrino kaj ŝia persistado, kiun ŝi transdonis al Johano, same kiel la kuraĝon kaj multajn aliajn kvalitojn.

Johano naskiĝis kaj kreskis en Jacmel (Ĵakmel), Haitio, sed post la baza lernejo li daŭrigis la studadon en Usono. Li revenis kiel diplomita advokato al Port-au-Price, la ĉefurbo.



Johano multege aŭskultadis la radion kaj tiel ekinteresiĝis kaj lernis lingvojn. Li mem laboris kiel radia prezentisto, tre engaĝita, organizante helpilojn por blinduloj, kaj eĉ kreis Societon por blinduloj en Haitio. La vivovojo portis Johanon denove al Usono kaj, jaron poste, en 1964 al Montrealo. Li estis korektanto de perkorespondaj kursoj por blindaj francaj, anglaj kaj Esperanto-lernantoj.

Loĝante en Montrealo, kiel tre societema homo, li aliĝis al diversaj asocioj kaj helpis krei novajn, ĉiam kun celo helpi al blinduloj aŭ

enmigrantoj : « Mult-etna asocio por integriĝo de handikapitaj personoj », « Haitia Asocio de Blinduloj kaj Malfortvidantoj de Kebekio » (*Association des aveugles et amblyopes haïtiens du Québec*, AAAHQ) kaj li plezure partoprenis Esperantajn kunvenojn en Montrealo kaj preskaŭ ĉiujn blindulajn Esperanto-kongresojn kaj Universalajn Kongresojn. Oni konas lin kiel volontulan kolektanton de blankaj bastonoj, skribmaŝinoj, okulvitroj, kaj li ĉiam trovas iun por porti aŭ mem portas aĵojn al Haitio. Eĉ tiu filma spektado kaj la koktelo estis organizitaj por kolekti monon por helpi blindulojn en Haitio.




Johano ĉiam havis intereson ne nur aŭdi pri io nova, sed li ĉiam provis samtempe ankaŭ helpi. Multaj spektantoj estis impresitaj pri lia socia implikiĝo. La filmo estas bona, eĉ se iom mankis dinamismo, ĉar ĝi ne montris sufiĉe da arkivaĵoj aŭ informoj pri Haitio ; la babilado kun haitia kuzino en kreola iom tro longis pro nekompreno (la aŭtoro de la filmo promesis estontan subtitolan tradukon).

Tiuj, kiuj ne konis Johanon, certe havis okazon paroli kun li kaj senti lian spontanecon, homan varmecon, lian deziron dividi kun tiuj, kiuj ne havas, kaj nepre aŭdi lin ridi kaj kompreni lian ĝojon por la vivo.

Johano kiel persono inspiras tiujn, kiuj pretas kunlabori kaj fari bonon. Li ĉiam subtenos tiajn homajn agojn por la feliĉo de iu — kiel li mem diras, por la feliĉo de iu frato.

Pli pri la filmo (france) ĉe :

- Radio-Canada : http://bit.ly/1qnUsyj
- La Presse : http://bit.ly/1sOzLgM



# Ĉe la fino de la mondo

*Yevgeniya (Ĵenja) Amis*

***Cette fois-ci, dans notre série japonaise, la rédactrice nous emmène à Shimonoseki, une ville « au bout du monde », dans la partie la plus occidentale de Honshu. Nous visitons la caverne Akiyoshi-doo : la plus longue au Japon, le mont brûlé et les bœufs de Mishima — les bœufs japonais dont il ne reste que quelques dizaines. Nous mangeons du poisson-globe et des « nouilles de toit », une spécialité de Shimonoseki !***

Ni staras en Ŝimonoseki, ĉe la plej okcidenta pinto de la japana ĉefa insulo Honŝu, kaj rigardas la sunon englutiĝi en la trankvilan maron. La suno estas flame-ruĝa… Estas novembro, sed ankoraŭ sufiĉe varmas en Japanio. Preskaŭ perfekte triangulaj, la montecaj insuloj elstaras el la maro kiel dorso de giganta naĝanta drako. Mi imagas min ĉe la fino de la mondo kaj provas bildigi al mi, kion en antikveco oni pensis, rigardante la maron de la sama loko… Por ili ĝi ja estis preskaŭ fino de la mondo, ĉar tie finiĝis la granda insulo kaj komenciĝis la maro… Antaŭ ĉ. 2500 jaroj oni enterigis lokanojn kun la vizaĝo direktita al la okcidento : al Ĉinio kaj Koreio, de kie, verŝajne, venis iliaj antaŭuloj. Mi imagas, ke ankaŭ vivante ili ofte staris tie ĉi, ĉe la maro, kaj rigardis al la okcidento, fabela tero de la prapatroj… Miaj pensoj vagas tra tempoj kaj lokoj, kaj kiam mi finfine revenas al la nuntempo, mi rememorigas al mi denove, kiom bonŝancaj ni estas pro Esperanto… kaj esperantistoj en Japanio ! Dank' al Esperanto ni vidis tiom da belaj lokoj, kaj tiun ĉi spir-prenan sunsubiron ĉe la « fino de la mondo », en Ŝimonoseki, kie eksterlandanoj maloftas.

## Balonfiŝo kaj Abe

Ŝimonoseki situas en la gubernio Jamaguĉi, ĉe la sud-okcidenta parto de la ĉefa japana insulo, Honŝu, kaj tuj apud la insulo Kjuŝu, ligita kun Honŝu per ponto kaj subakva piedira tunelo, per kiu oni povas atingi la alian insulon ene de 15 minutoj (en la plej mallarĝa loko la du insulojn dividas nur kelkaj 700 metroj da akvo). Kvankam negranda laŭ la loĝantoj (malpli ol 300 mil), la urbo kovras tre vastan spacon — « Ĝi estas vasta pli ol 23 'specialaj kvartaloj' de Tokio », precizigas nia amiko NITTA Takamiĉi. ('Specialaj kvartaloj' estas la kerna parto de Tokio.) Takamiĉi estas talenta juna esperantisto, kun kiu ni konatiĝis pasintjare en Osako kaj kiu jam la duan fojon fariĝis nia ĉiĉerono, kaj ĉi-foje ankaŭ gastiganto. En la nuna formo la urbo ekzistas de ne tre longe : ĝi estas rezulto de administra reformo, kiu okazis en 2005 plurloke en Japanio kaj kiu kunigis multajn proksimajn urbojn en unu, por malgrandigi administrajn kostojn. Tamen, neniu reformo povis malhelpi la daŭran elmigron de junuloj el Ŝimonoseki al pli grandaj urboj, kun pli da ebloj studi kaj labori, kaj pro tio multaj domoj staras vakaj kaj aĉeteblas malmultekoste — foje preskaŭ tute senpage, klarigas al ni Takamiĉi. Li estas malofta escepto el tiu regulo : studinte en Osako, li revenis hejmen, al Ŝimonoseki, kaj estas kontenta pri tiu elekto.



**Honŝu kaj Kjuŝu estas ligitaj per ponto super la markolo Kanmon**

Ŝimonoseki ĉiam estis kaj daŭre estas grava haveno de Japanio. Rigardante la urban panoramon de la observejo sur la monto Hinojama mi kalkulis pli ol dekon da ŝipoj en unu momento en la markolo Kanmon, inter Honŝu kaj Kjuŝu. Estas grandaj industriaj ŝipegoj portantaj la varojn inter Japanio kaj la du okcidentaj najbaroj, Koreio kaj Ĉinio, kaj diversgrandaj fiŝkaptaj boatoj. Fiŝkaptado — aparte la kaptado de balonfiŝo (japane : « fugu ») — estas grava industrio de la urbo, kio eĉ donis al la urbo la kromnomon « ĉefurbo de fugu ». Tiu ĉarma pufa fiŝeto videblas ĉie : jen kiel desegnaĵo

sur afiŝoj, jen kiel skulptaĵo surstrate, kaj jen eĉ kiel gravuraĵo sur kanalizaciaj kovriloj (*vidu la bildon*) ! Ĝis mia vizito al Ŝimonoseki mi kredis, ke balonfiŝoj estas venenaj. Tio veras, sed nur ĝis certa grado : la plejparto de balonfiŝoj, fakte, ne estas venenaj, kaj por kuiri la venenan specion oni bezonas longan trejnadon pri la ĝusta maniero eltranĉi la venenajn partojn, sukcesan ekzameniĝon kaj akiron de speciala permesilo. Kvankam manĝado de la venena specio preparita de rajtigita kuiristo en restoracio, ĝenerale, estas sekura, mi neniel volus provi tion, aparte post kiam Takamiĉi rakontis veran hororhistorion, en kiu patrino kuiris la venenan specion de balonfiŝo por sia familio, kaj, eĉ estante oficiale rajtigita kuiristo, ŝi tamen ne eltranĉis ĉiun venenon kaj neintence mortigis sian filinon (la veneno de balonfiŝo estas 1200-oble pli danĝera ol cianido)… Mi ne povas ne pensi kun teruro pri tio, kiom da homoj devis morti antaŭe, por ke nun oni sciu, kiujn partojn de la fiŝo oni devas eltranĉi…




Al nia granda surprizo, en la dua loko (post balonfiŝo) laŭ populareco ni vidis fotojn kaj desegnaĵojn de… la japana ĉefministro, Ŝinzoo Abe ! Kaj temas ne nur pri abundaj antaŭelektaj afiŝoj dismetitaj ĉie tra la urbo — temas ankaŭ pri skatoloj de kuketoj kaj bombonoj en ordinaraj vendejoj. La kialo estas simpla : en Japanio politikistoj ne havas kopirajton pri sia nomo kaj aspekto, kaj elpensemaj (kaj spritaj) komercistoj kun plezuro ekspluatas ilin por sia gajno, servante jen al la dekstruloj, jen al la maldekstruloj. Mi amuziĝis pri pakaĵo de « Subtenaj rizkuketoj por Ŝin-ĉan » (karesa formo de « Ŝinzoo »), kie li aspektis kiel heroo de japana animeo (*vidu la bildon*), kaj mi havis grandan tenton aĉeti « kafeore » (café au lait) : kaf-laktan miksaĵon kun iom karikatureca bildo de Abe kaj lia edzino, kaj kun amuza nomo : « Abenomix ». Abenomics (simile al Reaganomics aŭ Clintonomics) estas la kromnomo de la grandiozema ekonomi-stimula politiko de Abe, kaj « Abenomix » estas perfekta « japangla » vorto, kiu konsistas el la nomo « Abe » mem, la japana adjektiviga sufikso « no » kaj



la angla vorto « mix » por « miksaĵo », do, « Abe-miksaĵo ». Abe jam sepfoje elektiĝis kiel deputito (kaj dufoje fariĝis ĉefministro) reprezentante partojn de la plej konservativema gubernio de Japanio : Jamaguĉi, kie troviĝas la urbo Ŝimonoseki. « Mi ne estis en la urbo dum tiuj elektoj, do, mi ne kulpas… », ŝercas Takamiĉi.

## « Ne hobio — misio »

Takamiĉi naskiĝis en Ŝimonoseki kaj pro tio li scias la respondojn al preskaŭ ĉiuj niaj malfacilaj demandoj, kaj se hazarde li ne certas, la respondo venas la sekvan tagon post diligenta esploro (kelkfoje mi kun honto konstatis, ke mi mem jam forgesis la komencan demandon…). Dum nia nur kelktaga restado en Ŝimonoseki, Takamiĉi sukcesis malkovrigi al ni multajn vidindaĵojn de sia urbo kaj regiono. Antaŭ ĉio ni iris viziti la Esperanto-bibliotekon, kiun li mem fondis.

Kvankam ni jam sciis pri tiu ĉi bonega iniciato, tamen vidinte « vive » la Esperanto-bibliotekon, mia edzo kaj mi ne povis reteni nin de la samtempa krio : « Nekredeble! ». Ni atendis vidi modestan breton aŭ kelkajn bretojn en malgranda ejo (aparte konsiderante, ke spaco ĝenerale mankas en Japanio) — sed anstataŭe ni vidas enorman ejon de eble cento da profesiaj bibliotekaj bretaroj, en altega konstruaĵo. Ni ekscias, ke tiu konstruaĵo antaŭe estis universitata biblioteko, sed antaŭ deko da jaroj la universitato translokiĝis al alia loko, pro manko de studentoj, kaj ĝi ne sukcesis vendi aŭ luigi la konstruaĵon. Ni miras eĉ pli, eksciinte, ke Takamiĉi pagas nenion por lui tiun grandan ejon : nur la simbolan jaran kotizon al la grupo por utiligo de vaka spaco, kiu okupiĝas pri la uzo de tiu konstruaĵo. Nu, en ĉiu malbono estas ankaŭ iom da bono, ĉu ne ?


Nitta Takamiĉi apud la konstruaĵo, kie troviĝas la biblioteko

Dum la unuaj kvar monatoj la biblioteko ricevis jam ĉirkaŭ mil esperantaĵojn de diversaj urboj en Japanio, rakontas Takamiĉi.



**Joel Amis, naskiĝinta en Usono, tuj trovis la libron « Certe triumfos la popolo de Vjetnamio, certe malvenkos la usonaj agresantoj »**

Krom, kompreneble, libroj kaj gazetoj, troviĝas tie ankaŭ insignoj, flagoj, portreto de Zamenhof kaj diversrilataj dokumentoj. « Nun ni kolektas librojn, revuojn, gazetojn, sonbendojn, taglibrojn, pamfletojn, fotojn kaj tiel plu — unuvorte dirite, ĉiaj esperantaĵoj estas bonvenaj, eĉ plej efemeraj paperetoj difektitaj aŭ kriplaj, ĉar spaco por akcepti sufiĉas », diras Takamiĉi. Al mia demando, kial li decidis fondi la bibliotekon, li klarigas, ke nur unu biblioteko (tiu de Japana Esperanto-Instituto, en Tokio) ne sufiĉas por granda lando, kiel Japanio. Due, Esperantujo daŭre perdas valorajn librojn post forpaso de maljunaj Esperantistoj, ĉar ofte organizaĵoj simple ne havas lokon por akcepti la kolektojn. Kaj laste, li pensas, ke estas iom danĝere havi ĉiujn librojn en unu loko, ja en Japanio oftas tertremoj… Takamiĉi feliĉas, ke la biblioteko de Ŝimonoseki troviĝas tre alte, do, eĉ se tertremo okazus, ĝi tamen neniel povus esti trafita de cunamo. « Do, ĉu la biblioteko estas via ĉefa hobio ? » « Ne hobio — misio », korektas min Takamiĉi, kiu pasias pri muziko kaj historio de la Esperanto-movado en Japanio, aparte tiu de Ŝimonoseki, kie loĝis kelkaj famaj japanaj Esperantistoj : poeto kaj pentristo Uejama Masao kaj instruisto kaj verkisto Nohara Kiuiĉi (unua laŭreato de la prestiĝa japana premio Ossaka), kies tri libroj, donacitaj de la aŭtoro mem al la biblioteko de la urbo Ĉofu, nun en Ŝimonoseki, konserviĝas tie ĝis nun. (Se vi ŝatus donaci materialojn al la biblioteko en Ŝimonoseki, sendu ilin al JP759-6312, Shimonoseki-shi, Toyoura-cho, Kuroi 1801-4, Nitta Takamichi, Japanio).

## Meduzo sur akvofalo


Unu el la plej vizitindaj lokoj en la gubernio Jamaguĉi estas la urbo Mine, la hejmo de la fama kaverno Akijoŝi-doo. Kun preskaŭ naŭ kilometroj da trapasejoj (kvankam nur unu kilometro estas malfermita al la publiko), ĝi estas la plej longa kalkŝtona kaverno en Japanio kaj unu el la plej longaj en la mondo. Per interesa hazardo, tiu

kaverno estas ligita al Esperanto : la persono, kiu malkovrigis ĝin al la publiko, estis kimro Edward Gauntlett. S-ro Gauntlett estis Esperantisto kaj anglalingva instruisto, kies unua koresponda kurso de Esperanto en Japanio altiris ĉ. 600 lernantojn kaj fariĝis bazo por la fondiĝo de Japana Esperantista Asocio (antaŭulo de Japana Esperanto-Instituto) en 1906. En Jamaguĉi oni bone memoras kaj tre respektas tiun elstaran kimron (en la scienca muzeo apud la kaverno mi fotis la statuon de s-ro Gauntlett), eĉ se nur malmultaj scias, ke li estis Esperantisto.

Kvankam la lokanoj sciis pri la ekzisto de tiu kaverno, tre malmultaj kuraĝis iri tien : por ili ĝi estis stranga, timiga loko. Antaŭe tie ja ne ekzistis komforta ligna ponto super la lageto, kiun oni devas trapasi por eniri en la kavernon... Ne estis ankaŭ iu ajn lumo apud la monstrecaj



Ora Kolono



Mil Rizkampoj

kalkŝtonaj formaĵoj, nek busetoj inter la enirejoj de la kaverno dum la alta turista sezono. Multo ŝanĝiĝis ekde kiam s-ro Gauntlett la unuan fojon venis al la kaverno — restis preskaŭ neŝanĝitaj nur la naturaj stalaktitaj kaj stalagmitaj skulptaĵoj, por kiuj cent jaroj estas kiel unu sekundo. Mi certas, ke sub la malforta tremanta kandellumo, pliigita de viva imagipovo, timo kaj la respeguliĝo de la kandellumo sur la akvo, la stalaktitaj « monstroj » aspektis kiel vivantaj, do, ne estas surprizo, ke homoj antaŭe pensis, ke tie loĝas demonoj kaj ne kuraĝis viziti la kavernon. Tiuj strangaj formaĵoj havas same strangajn kaj « bildecajn » nomojn : Mil Rizkampoj, Reĝo de la Kaverno, Diino de Kompato, Reĝa Kolono, Meduzo Grimpanta Akvofalon kaj Ora Kolono — majesta formaĵo, kiu aspektas kiel akvofalo, kiu, pro iu sorĉo, subite ŝtoniĝis.

Post longa promenado, ni fine resurfaciĝas kaj, kiam niaj okuloj

realkutimiĝas al la sunlumo, ni iras viziti la parkon kaj natur-rezervejon Akijoŝi-dai. Rigardante de la observejo suben, oni povas apenaŭ kredi, ke oni daŭre estas en Japanio : anstataŭ kutimaj japanaj montoj, dense kovritaj per arbaroj, oni vidas… stepon. La altebenaĵo Akijoŝi-dai preskaŭ ne havas arbojn, kaj tiuj kelkaj, kiuj estas, estas malgrandaj kaj ofte pli similas la arbojn en afrika savano, sen folioj aŭ branĉoj sube, kaj nur kun larĝa triangula krono supre. Anstataŭ arboj ni vidas tutan aron da formaĵoj el kalkoŝtono, kiuj aspektas de malproksime kiel dentoj de giganta ŝarko. Antaŭ 300 milionoj da jaroj tie estis korala rifo, kaj la kalkoŝtonaj formaĵoj, eroziitaj de la pluvo, estas vivanta atesto pri la mara origino de tiu loko. Rigardante pli atente oni konstatas, ke la stepo estas tre klare difinita… kvazaŭ oni intence bruligis tiun specifan lokon por krei herbejon, kaj lasis apudajn lokojn netuŝitaj. La ŝildo en la parko konfirmas tiun supozon : efektive, la monto antaŭ ni estas « bruligita monto », tradicio, kiu estiĝis



Bruligita monto

dum la transira periodo de bestoĉasado al bestobredado, ĉar ĝi donas perfektan herbejon, riĉigitan de cindro, por paŝti bestojn, kaj ankaŭ preventas eventualajn naturajn fajrojn. Se oni iras al Akijoŝi-dai februare, oni eĉ povas partopreni en la ceremonio okaze de la ĉiujara montobruligo : « jamajaki ».

## « Specialaj bovoj »

De la « ĉefa tero » ni transiras longegan kurban ponton al Cunoŝima : insulo, kie loĝas ĉirkaŭ 900 personoj. Tiu ponto estas la dua plej longa ponto al izolita insulo en Japanio, konstruita antaŭ deko da jaroj kaj kiel turisma allogaĵo (somere la ponto plenas je homoj, kiuj venas vidi la akvojn de du maroj kuniĝi), kaj por pli bone servi la homojn sur la insulo, ekzemple, por ambulanco. Ironie, la konstruo de tiu ĉi ponto havis malan efikon sur la loĝantaro de la insulo kaj, anstataŭ instigi la homojn resti tie, ĝi faciligis la elmigron de pluraj lokanoj al la ĉefa insulo.

Cunoŝima estas majesta, griza kaj trankvila,

preskaŭ senhoma. La sola afero, kiu malbonigas la pejzaĝon, estas la amaso da rubaĵoj alportitaj per la vento de la okcidentaj najbaroj : Ĉinio kaj Koreio…

Ni traveturas la marbordan parton de la insulo kun la stranga nomo « Kottoi », kiu tute ne sonas kiel japana vorto. Takamiĉi diras, ke ĝi estas unu el la plej nekompreneblaj geografiaj nomoj, kaj ofte nur la lokanoj scias, kiel ĝuste prononci ĝin. Ĉinlitere ĝi skribiĝas kiel 特牛 kaj signifas « speciala bovo » — laŭ la kutima japana legado ĝi devus prononciĝi kiel « Tokuuŝi » kaj tute ne kiel « Kottoi » : la vorto ne havas sencon en la japana lingvo, sed eble havas sencon… en la sumera lingvo ! Kvankam oni ne estas certaj, laŭ unu teorio (kiun eĉ subtenas la prezidanto de la Japana Petroglifa Societo), kelkaj sumeraj triboj venis al Japanio antaŭ ĉ. 4000 jaroj kaj eĉ lasis kelkajn petroglifajn skribaĵojn sur ŝtonoj. Sur la insulo ĝis nun troviĝas ŝtonoj kun petroglifaj skribaĵoj. Ĉu hazarde aŭ ne, la sumera vorto « Kotte » signifas « bovo »…

« Do, ĉu specialaj bovoj loĝas sur la insulo ? », mi scivolemas. Post dek minutoj venas la vivanta respondo al tiu demando : ni vidas ĉarmajn brunajn bovojn, malpli grandajn kaj, ŝajne, iom pli fortikajn ol eŭropaj bovoj. Fakte, tiuj ja estas tre



**1.780 metrojn longa ponto al Cunoŝima**

raraj kaj specialaj bovoj nomataj « Miŝima-uŝi » (Miŝima-bovo), kies antaŭuloj estis importitaj de Ĉinio tra Koreio, supozeble, ĉ. la jaro 500, kaj estis ĉefe uzataj por agrikulturi. Somere la bovoj loĝas sur sia « hejma » insulo, Miŝima (iom pli norde de Cunoŝima), sed por la malvarma sezono oni venigas ilin al la pli suda insulo kun pli milda klimato, Cunoŝima. Nun restas nur kelkdek Miŝima-bovoj (kiuj, cetere, restis en sia « pura » formo, neniam intermiksitaj kun eŭropaj bovoj) kaj ili nun estas protektataj kiel naturaj monumentoj de Japanio.

Reveninte de la insulo al la ĉefa tero, ni vizitas interesan antropologian muzeon, kaj elirante mia edzo demandas al Takamiĉi, kiel nomiĝas ŝintoa ofertopleto, ekspoziciata en la muzeo. « A, mi ne

certas… Eble, ni iru demandi al la direktoro de la muzeo. » Malgraŭ niaj protestoj (« al la direktoro de la muzeo ? kun tia bagatela demando ? ») ni timeme eniras la laborejon kaj laboratorion de la muzeo. La laborantoj rigardas nin kun scivolemo : ŝajne, eksterlandanoj ne ofte venas por demandi pri japanaj religiaj objektoj, kaj la honora direktoro kun plezuro respondas niajn demandojn. Li bone konas Takamiĉi, ĉar ili ambaŭ havas sian bibliotekon sur malsamaj etaĝoj de la sama konstruaĵo.

## Tegolaj nudeloj

Forirante por du monatoj al Japanio, mia edzo esperoplene deklaris, ke li planas tie maldikiĝi. Kaj vere, japanaj manĝaĵoj ĝenerale estas pli sanaj kaj malpli grasaj ol nord-amerikaj manĝaĵoj, do, tiu plano sonis tre bone… en teorio. Praktike, maldikiĝi neniel eblis, simple ĉar la japanaj manĝaĵoj estas nekredeble bongustaj (kaj dum ni estis tie, kvazaŭ por konfirmi tion, la japana tradicia manĝaĵo estis deklarita mondheredaĵo de UNESKO !). Kaj due, ĉar pri ni ĉiam zorgis gastamaj japanaj Esperantistoj. En nia lasta tago Takamiĉi malkovrigis al ni specialaĵon de Ŝimonoseki, pladon kun nekutima nomo : tegolaj nudeloj (japane « kaŭara-soba »). Antaŭe oni kuiris ĝin sur varmegaj tegoloj sub la suno, lasante ilin rostiĝi. (Mi faras mensan rimarkon, ke la inventisto de tiu bongustega plado estis genia pigrulo… certe viro, ĉar nur viro havus la ideon kuiri manĝaĵon surtegmente… Vere, pigreco estas patrino de inventemo !) Nun oni preparas la nudelojn en la forno, sur speciala pleto, sed servas sur eleganta kurba japana tegolo, kiu funkcias kiel telero. Nu, eĉ se oni nun ne plu kuiras nudelojn


Malaltaj kaj fortikaj Miŝima-bovoj estis tradicie uzataj por agrikulturo


**Manĝante tegolajn nudelojn**

sur tegoloj, tamen oni povas manĝi tiun pladon en ĉiu sezono kaj ĉiu tempo de la tago, kaj ne nur en la plej varmaj tagoj de somero ! Ni manĝis la plej tradician version de tegolaj nudeloj : el fagopira faruno kun verda teo (kiu igas la nudelojn verdaj), superŝutitaj per tranĉaĵoj de ovaĵo, seka marplanto kaj pecoj de bovaĵo, dum ni ĝuis la belan vidaĵon sur la markolon en restoracio Heike (verŝajne, ŝatata ankaŭ de s-ro Abe, kies foton faritan en tiu restoracio oni fiere ekspozicias ĉe la akceptejo).


Mil-jara kamforarbo (27 m alta, 58 m vasta okcident-oriente kaj 53 m vasta nord-sude)


Sanktejo Fukutoku-inari, fondita antaŭ mil jaroj kaj konata per belvido de la maro « Hibiki-nada ».

Reveninte al la domo de Takamiĉi, nin atendis plia abunda vespermanĝo preparita por ni de la familio, kun fritita balonfiŝo (nevenena, kompreneble !) kaj pluraj aliaj bongustaĵoj. Profunde kortuŝis min, ke la patrino atentis, kiujn manĝaĵojn mia edzo kaj mi prenis unue dum la antaŭa manĝo, kaj ŝi preparis tiujn du pladojn ankaŭ por nia lasta manĝo ĉe ili (mi devis konfesi, ke mi mem ne memoris, kion mi prenis unue, kaj same mia edzo). Por adiaŭi, la avino de Takamiĉi donacis al ni du ĵarojn de alia fama specialaĵo de Ŝimonoseki : peklita eĥino (mara erinaco), la plej bona en la tuta Japanio, laŭ nia amikino el Kioto, Masako TAHIRA. Se ni iros al Japanio plian fojon, mi rekomendos al mia edzo forlasi la esperon maldikiĝi ! Unue, tio simple ne eblas… kaj due, tio tute ne indas !

# Lingvo kaj egaleco

***Nicolas Viau***

***La justice et les droits linguistiques intéressent naturellement de nombreux espérantophones. Il est donc normal qu'ils participent à l'organisation de conférences et autres événements pour pousser la réflexion sur le sujet. Tel était le but du symposium sur la langue et l'égalité ayant eu lieu à New York, en face du siège de l'ONU, le 29 avril dernier. Nicolas Viau a eu la chance d'y représenter TEJO, l'Organisation mondiale des jeunes espérantophones. En voici son compte rendu.***

## Enkonduko

Kiel fartas la lingvoj de la mondo ? Ĉu multlingveco estas bone prizorgata de internaciaj kaj aliaj institucioj ? Kiel mastrumi ĝin en la nuna tempo kaj en ŝanĝantaj nacioj kaj socioj ?

Tiuj estas nur kelkaj el la demandoj, kiuj estis priparolataj dum simpozio pri la temo « Lingvo kaj egaleco », kiun mi partoprenis la 29-an de aprilo en Novjorko, Usono (tuj apud la ĉefsidejo de la Unuiĝintaj Nacioj) kiel TEJO-reprezentanto (dankon al Lætitia pro la propono !). La simpozion organizis Laborgrupo pri Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj *(The Study Group on Language at the United Nations)* kaj CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj), kaj ĝi estis gvidata de Humphrey Tonkin kun helpo de Mark Fettes (prezidanto de UEA).

En la konferenco partoprenis ĉefe akademianoj, sed venis ankaŭ kelkaj prelegantoj el aliaj fakoj, inkluzive la ambasadoron ĉe UN de Franclingvio (*Francophonie*), Filippe Savadogo, kies parolado malfermis la simpozion.

Kvankam la simpozio estis organizita parte de Esperantistoj, ĝi ne estis Esperanto-aranĝo, kaj la prezentado okazis angle. Tamen, venis kaj helpis pluraj lokaj samideanoj interesiĝantaj pri la temo. Ni pensu, ekzemple, pri Neil Blonstein, kiu volontulas ĉe UN por reprezenti UEA.

Kvankam, klare, ne eblus prezenti ĉiujn detalojn ene de tia artikoleto, jen kelkaj el la prezentitaj temoj.

## Ĉu lingvaj rajtoj forgesitaj de UN ?

Mark Fettes, nuna prezidanto de UEA, recenzis la dokumentaron de UN pri daŭripova disvolviĝo. Li serĉis en 18 altnivelaj UN-dokumentoj kaj trovis, ke nur 4 mencias lingvojn aŭ lingvajn rajtojn. Ŝajnas do, ke lingvaj rajtoj kaj justeco el lingva vidpunkto ankoraŭ estas ege progresinda agadkampo por UN.

Bedaŭrinde, kvankam UN oficiale apogas multlingvecon, ankaŭ ĝiaj institucioj havas problemojn por vere respekti tiujn principojn, kaj pro praktikaĵoj, kaj pro buĝetaj kialoj. Pri tio prelegis Lisa J. McEntee-Atalianis, el Britio, prezentante sian studon pri lingvaj politikoj kaj praktikoj ene de la Internacia Mara Organizaĵo en Londono, kie la realo, bedaŭrinde, ne ĉiam atingas la politikajn celojn.

## Kio estas egaleco ?

Aliaj temoj priparolataj koncernis egalecon mem. Kio estas egaleco ? Yael Peled (naskiĝinta en Israelo, sed nuntempe esploristino en Montrealo) difinis lingvan egalecon kiel « kompleksan egalecon » : oni konstatas malegalecon, kiam estas malsamaĵoj en ne nur unu, sed multaj sferoj samtempe (ekzemple, ekonomia, kultura, simbola,



Dum la prelego de Humphrey Tonkin

politika, socia kaj aliaj). Paroli pri lingvo (kiu rilatas al multaj sferoj) kaj egaleco estas do nesimpla afero…

## Kaj la internacia lingvo ?

Oni ne multe parolis pri Esperanto specife, sed la prelego de Esther Schor, el la Universitato Princeton, rimarkindis. Ŝi parolis pri la penso de Zamenhof kaj ĝia evoluo laŭ la jaroj. Ĉu Esperanto estis nova siaspeca komununo aŭ kreaĵo liberiganta individuojn, permesante al ili libere komuniki kun aliaj homoj ? Ĉu Esperanto estas pli lingvo aŭ pli movado ? Laŭ la prelegintino, oni povas ignori nek la unuan, nek la duan aspekton.

## Stato de lingvaj malplimultoj

Kelkaj parolantoj ankaŭ prelegis pri lingvaj malplimultoj kaj iliaj rajtoj, ekzemple pri edukadaj kaj lingvaj rajtoj de infanaj sendokumentaj migrantoj en Usono, kie la lerneja sistemo ne ĉie kaj ne ĉiam estas adaptita al tiaj lernantoj. Prelegantinoj de Aŭstralio faris similan recenzon de la lingvoedukadaj politikoj de sia lando, kiu nun enhavas multe da diverslingvaj malplimultoj tra enmigrado.

Alia interesa prezentado temis pri la tre multaj lingvoj kaj skribsistemoj de Barato (prezentita de Anshuman Pandey) kaj la helpo, kiun teknologio povas alporti tra komputilaj normoj kiel Unikodo, permesante, ke tiuj lingvoj estu uzataj en modernaj komunikiloj kaj estu iel legitimaj. Li prenis kiel ekzemplon la gondan lingvon (el la dravida lingvofamilio) de Barato.

En posta parolado estis interese priskribita la nuntempa situacio de la kataluna lingvo. Ĉu oni vere konsideras ĝin endanĝerigita lingvo ? Unuflanke, la kataluna daŭre estas « malplimulta » lingvo (ĉefe) ene de Hispanio, kiu travivis ege malfacilan periodon dum la pasinta jarcento kaj kiu ne plu havas unulingvajn parolantojn. Aliflanke, ĝi iĝis multe pli forta dum la pasinta trideko da jaroj, kaj, laŭ la prelegantino, kelkaj neparolantoj ene de katalunlingvio eĉ opinias, ke iliaj lingvaj rajtoj ne plu estas respektataj, precize pro la fortiĝo de la lingvo.

## Lingvoj kaj edukado

Oni parolis ankaŭ pri la nuna rolo de la angla en edukado kaj scienco. Pluraj eŭropaj universitatoj nun ofertas kursojn en la angla, interalie por ŝajni pli allogaj al eksterlandaj studentoj. Sed kio perdiĝas tra tia adaptiĝo al la universitata merkato ? Kio okazas, kiam nek ĉiuj profesoroj, nek ĉiuj studentoj bone regas la lokan lingvon ?

Ĉu tio endanĝerigas la aliron al edukado ? Ĉu la naciajn lingvojn mem ? Edukado jam certe estas unu el la plej gravaj modernaj konkurenckampoj por lingvoj.

## Lingvoj, povo kaj riĉeco

Mi fakte tre ŝatintus aŭskulti pli da prelegoj kiel la tujsupra, ĉar ne estas nur problemoj por lingvaj malplimultoj, sed ekzistas multaj defioj ankaŭ en la kampo de internacia komunikado, kiuj rilatas al edukado, ekonomio kaj simbola povo. Tiuj, kiuj bone regas la lingvon, havas grandan avantaĝon dum debatoj, intertraktoj, lernado. Ili estas sendependaj, kvankam multe da kromlingvaj parolantoj ĉiam konservos lingvajn malfortojn kaj dubojn. Ne nur individuoj ĝuas tiujn avantaĝojn, sed la tuta parolantaro kaj ties landoj.

Klare, estas gravege paroli pri lingvaj rajtoj. Oni ankaŭ sufiĉe parolas pri la bedaŭrinda perdo de kulturo, kiam lingvo malaperas. Sed ne temas nur pri etaj malplimultoj, ne nur pri emociaĵoj, temas fakte ankaŭ pri povo, riĉeco kaj influo. Paroli sian lingvon estas kiel centriĝi. Esti devigata paroli alian lingvon iumaniere periferiigas la personon. Tiuj politikaj kaj ekonomiaj temoj gravegas kaj decidos kiel la mondo estos, ja lingve, sed verŝajne ankaŭ aliaspekte.




Nicolas (centre) en la UEA-oficejeto ĉe UN

## Surpriza vizito

La simpozio okazis en la *Church Center of the United Nations*, konstruaĵo tuj apud la ĉefsidejo de UN *(vidu la foton)*. Ĝi estas ne nur konferencejo, sed, ankaŭ pli grave, ĝi loĝigas plurajn neregistarajn organizojn reprezentatajn ĉe UN, kiel UEA. Danke al Neil Blonstein mi havis la ŝancon viziti tiun UEA-oficejon, kaj fotiĝi kun lokaj esperantistoj !

*Fotoj : Neil Blonstein*



Literature

# La Idoj de la Suno

*Dennis Drown*

## Ĉapitro 3

*Estas bone por viro, ne tuŝi virinon. Sed pro malĉastaĵoj ĉiu viro havu propran edzinon, kaj ĉiu virino havu propran edzon. La edzo donu al la edzino ŝian rajtaĵon ; tiel same ankaŭ la edzino al la edzo. Ne la edzino, sed la edzo rajtas pri ŝia korpo ; tiel same ankaŭ ne la edzo, sed la edzino rajtas pri lia korpo. Ne senigu unu la alian, krom eble kun konsento por kelka tempo, por ke vi dediĉu vin al preĝado, kaj kuniĝu denove, por ke Satano vin ne tentu pro manko de sinregado.*

*- Al la Korintanoj 1, Ĉapitro 7*

Ĝarelo vekiĝis. Mallaŭtaj ĝemoj venis de la alia flanko de la ĥato. Li ellassis etan, frustritan suspiron. Jen denove, li pensis. Ĝarelo turnis sian kapon kaj vidis la du formojn, malrapide moviĝantajn unu sur la alia. Jam delonge li rezignis pri la ideo, ke tiuj noktaj ludoj, kiujn lia patro ludas kun lia patrino, venigus por li frateton. Li buliĝis sub sia kovrilo, refermis siajn okulojn, provante reendormiĝi. Li ne sukcesis. Anstataŭ dormo venis amaso da pensoj pri la novvenintoj. Verŝajne li estis sonĝanta pri ili, antaŭ ol liaj gepatroj vekis lin. Ĝarelo ankoraŭ ne estis vidinta ilin, sed multajn onidirojn li jam aŭdis.

« Kristanoj » ili nomiĝis laŭ la tribanoj. Jam de du pluvsezonoj oni parolis pri tiuj homoj de la alia mondo, kiuj venos tien ĉi por vivi kun la tribo. Kial ili volas veni tien ĉi ? Unu el ili, la patro, jam venis

unufoje al la vilaĝo, sed Ĝarelo estis for kun sia patro por ĉasi vulpon. Kiam ili revenis kvar tagojn poste, la *tuvfa* jam estis forverturinta. Ĝarelo ne sciis kion pensi pri ili, kvankam lia patro havis fortan opinion pri la tuta situacio.

« Ili volas, ke ni forgesu, ke ni estas Taŭaklaj, » li diris al la patrino de Ĝarelo. « Ili volas mortigi niajn prapatrojn. Ni forgesos, kiuj ni estas ! »

Sed kiel mi povus forgesi, ke mi estas Taŭakla ? Ĝarelo demandis al si, la unuan el aro da demandoj. Ne temas pri memoro aŭ forgeso. Li grimacis, prenis sian kovrilon al sia buŝo kaj maĉetis ĝin. Mi estas Taŭakla. Ni estas ĉiuj la Taŭakla, la idoj de la Suno. Tion diras mia patro. Tion diras Imigko kaj Keĉago. Ĉu la *tuvfaek* estas iaj sorĉistoj ? Dum ni dormos kaj sonĝos, ĉu ili forgesigos nin pri niaj prapatroj ? Ĉu ili sorĉos nin ? Sed kiel ni povus forgesi niajn prapatrojn ? Ni estas Taŭaklaj, kaj kiel ni ne scius tion ? Ĉiuokaze, mi ne pensas, ke ili vere volas forgesigi nin pri io ajn. Kial ili farus ion tian ?

Tiam li pensis pri Eta Anja. « Eta Anja eble scios ion », li flustris. Ŝi iris al ilia ĥato kun ili, kiam ili alvenis. Ŝi sekvis ilin tien. Krome, ŝi lernoservas ĉe Imigko. Ŝi devas scii pri ili. Morgaŭ mi trovos ŝin.

Mallaŭta ronko de lia patro interrompis la pensojn de Ĝarelo. Finfine ili dormas, li pensis, kaj post nelonge ankaŭ Ĝarelo ree ekdormis. Li falis malrapide en sonĝon, kiun li jam tre bone konis, sed neniam povis rememori, kiam li vekiĝis. Ankoraŭ-foje la Suno venis viziti lin.

* * *

Laŭ sia kutimo Stefano vekiĝis frue tiun matenon. Eĉ antaŭ ol li ellitiĝis, li memoris la kafo-problemon. Terure mankis al li lia kafo. Ili forgesis alporti iom kun si, kaj nun li ekscivolis, ĉu eblas akiri kafon ĉi tie. Verŝajne ne, li decidis. Li sentis sin iom grumblema sen scii la kialon. Ne temis nur pri manko de kafo. Jen, li pensis, ni estas ĉi tie. La revo realiĝas. Ni alvenis al fora lando por doni al tiu ĉi popolo gloran mesaĝon. Ili ekkonos Jesuon. Iliaj vivoj ŝanĝiĝos por ĉiam. Kial mi ne povas pensi pri tio, anstataŭ pri ĉiuj etaĵoj, kiel la fakto, ke mia familio ne parolas la lingvon de ĉi tie. Tiu ĉi laboro estas ege grava. Mi sentu min dankema, ke Dio elektis min por disparoli Lian mesaĝon. Mi pensu pri la preĝejo, kiun ni konstruos en tiu ĉi vilaĝeto. La tribanoj havos domon de la Sinjoro. Kial mi pensas pri kafo ?

En blanka piĵamo li sidiĝis ĉe sian skribotablon. La ligna seĝo impresis lin malmole, kaj dum momento Stefano revetis pri sia leda seĝo, kiun li

estas forlasinta hejme. Tiam li forigis la penson el sia menso kaj prenis paperblokon kaj plumon el sia teko. Li ekskribis, « Ĉefplano : La Taŭakla, » ĉe la supro de la paĝo. La skribotablo estis farita el kruda ligno. Ĝi ne entute stabilis kaj iom ŝanceliĝis de unu flanko al la alia, dum li skribis. Stefano ĉesis skribi. Li suspiris. Finfine li decidis, ke laŭeble li ne frustriĝu pro io tiom sengrava, kiel ŝanceliĝema tablo. Li paŭzis, profunde enspiris, kaj finfine ellasis etan ridon pro sia propra emo esti tiom facile ĝenata. Tiam li metis la plumon mezen de la paĝo kaj skribis, « Konstrui preĝejon. » Do mi komencos, li pensis, per la plej ĝojiga punkto kaj poste enmetos ĉion, kio antaŭas ĝin. Tiam li supreniris iomete kaj skribis, « Traduki la Evangelion. » Tiu punkto fakte ŝajnis al li pli malfacila ol tiu de la preĝejo, kiu efektive devis veni poste. Li urĝ-rapide skribis novan punkton supre de la aliaj, « Plibonigi lingvan scipovon. » Skribinte tion, li sentis sin iom pli trankvila, kaj skribis subpunkton sub tiu lasta, « Kreu vortaron el viaj notoj. »

Stefano kutime malemis fari listojn aŭ skribitajn planojn tiajn. Foje tamen, kiam tiom da farendaĵoj ŝajnis superverŝi lin, li trovis, ke helpas surpaperigi kaj ordigi la farendan laboron. Sekve, kiam li povis vidi ĝin sur papero, ĉio ekŝajnis farebla denove. Jam per skribo de tiuj unuaj taskoj, li jam eksentis sin malpli streĉita. Tiam li rapide kaj diligente skribis la ceteron de la plano, metante ĉiun grandan taskon kiel punkton, kaj listigante la bezonatajn subpunktojn por ĝin plenumi. Post nelonge li finskribis la planon kaj komencis legi ĝin ekde la komenco. Nun li sentis denove iom de la pasio, kiun li havis pri tiu ĉi misio, antaŭ ol li pasigis semajnon vojaĝante ĉi tien kun konsternema edzino kaj malkontentega filino. Nun la kialoj de tiu ĉi glora tasko reekvidiĝis. « Tiu ĉi popolo, » li flustris, « ho, Sinjoro, estas kvazaŭ mi pensas pri ili, kiel pri sovaĝuloj ! Tiuj ĉi personoj ekkonos Jesuon la unuan fojon. Ili aŭdos pri Li je la unua fojo de sia ekzistado. Ili aŭskultos Lian mesaĝon. Ili konstruos Lian domon ĉi tie, kaj tien ili iros por preĝi kaj kanti kaj tiel glorigi Lin. Patroj lernos, kaj ili instruos al siaj gefiloj, kaj tiuj poste instruos al siaj propraj gefiloj. Tiu ĉi vilaĝo estos savita ! Antaŭ enlitiĝo, avinoj rakontos al siaj genepoj rakontojn el la Biblio. Mi povas vidi tion ! »

Tiam pli malluma penso revenis en lian menson, io, kion diris al li lia patro, kiam Stefano unue parolis al li pri la misio ĉe la Taŭakla. « Kio pri la gepatroj de tiuj avinoj ? Kio pri la prauloj de tiu ĉi vilaĝo ? Ili neniam aŭdis vian 'Bonan Novaĵon.' Ili

neniam aŭdis eĉ la nomon de Jesuo, eĉ unu fojon dum sia tuta vivo. Ĉu ili ĉiuj naskiĝis, vivis, kaj tiam mortis, nur por iri al eterna kondamno en la infero ? Kiel Dio povas damni homon, kiu neniam eĉ aŭdis pri Li ? »

Tiutempe Stefano ne havis bonan respondon, kaj ekde tiam la demando foje mordetis lin. Li scivolis, kial li neniam povis igi sian patron kompreni, ke profunde en li estas io, estas voĉo, kiu flustras al li. Stefano sciis, ke ĝi estas la voĉo de Dio, vokante lin. Dio havas planon. Dio volas savi tiujn ĉi homojn.

Stefano ankoraŭ ne sciis, kion pensi pri la demando de lia patro, pri la prauloj de la Taŭakla, kaj pri tio, kio eble okazis al iliaj animoj. Li sciis nur, ke lia loko estas en tiu ĉi vilaĝo nun. Lia respondeco estas por vivantoj. Dio devus zorgi pri tiuj, kiuj venis antaŭe.

Stefano faligis sian kapon en siajn manojn. Ĉu ili ja devis iri al la infero ?

« Ĉu vere dum du jaroj mi devas iri al la necesejo, kie estas neniu necesejo, Paĉjo ? Estis sufiĉe strange, kiam ni bivakis survoje ĉi tien, sed nun estas aliaj personoj ĉi tie. Iru en la montetaron, vi diris al mi. Ili ĉiuj iras en la montetaron ! Kio, se oni vidos min ? » Barbara rigardis sian patron, kaj ŝiaj okuloj plorpetis pli bonan solvon. Stefano havis neniun respondon por ŝi, krom la severan kaj ĝenatan mienon de persono, kiu volas, ke ĉiuj tuj lasu lin sola. Ŝi ne sciis tion ĉi, sed denove li povis pensi nur pri tio, kiom terure li volas sian kafon. Ŝi diris nenion pli. Ŝi jam tro bone konis tiun rigardon, kaj ŝi sciis, ke se ŝi daŭrigus, li baldaŭ treege koleriĝus.

Ve ! Tiu ĉi loko jam sufiĉe mizeras sen unu el liaj koleregoj, ŝi pensis kaj piediris el la domo kaj komencis promeni rapidete al la montetoj, esperante trovi lokon sufiĉe taŭgan por dumtempa necesejo. « Sed tio ĉi devas ŝanĝiĝi ! » ŝi diris al si mem, post kiam ŝi estis sufiĉe for, ke ŝia patro ne povu aŭskulti ŝin. « Aferoj ja devas ŝanĝiĝi. »

Stefano rigardis ŝin foriri kaj tiam returniĝis al sia laboro. « Kara Sinjoro, kiel eblas, ke ni forgesis la kafon ? »

La montetoj ne estis proksime, kaj necesis iom da tempo por atingi ilin. Barbara ekdemandis sin, kio okazos, kiam vere urĝos la bezono. « Paĉjo volas savi tiujn ĉi homojn de la infero, » ŝi diris mallaŭte, « sed ŝajnas al mi, ke ili jam estas tie. Ili loĝas en la infero. Kaj kio nun sekve ? Nun ni venis al la infero por kunloĝi kun ili. »

Ĉe la bazo de monteto estis kelkaj knabetoj sidantaj sur la grundo, ludantaj ian ludon kun rokpecoj. Kvankam, antaŭ ol ŝi alvenis, ili estis sufiĉe bruaj, parolante, ridante kaj ŝajne amuziĝante, ili tuj eksilentis, kiam ili ekvidis ŝin. La ludo finiĝis, kaj ĉiuj fikse rigardis ŝin, dum ŝi alproksimiĝis. Tiam unu diris ion, « *Tuvfa* ». Barbara ne sciis, kion signifas tiu vorto, sed jen ili ĉiuj plenvoĉe komencis ĉanti ĝin. « *Tuvfa, tuvfa, tuvfa, tuvfa, …* » Ili ne ĉesis, nur rigardis ŝin, ripetante tiun saman vorton, « *tuvfa*, » ree kaj ree.

Barbara sentis sin treege malkomforte kaj ekŝvitis. Kio estas *tuvfa*, damne ? Kion ili faraĉas ? Ŝi sentis subite, kvazaŭ ŝi baldaŭ ekplorus, kaj ŝi komencis kuri. Ŝi rapidis preter ilin en la montetaron. Malantaŭ si, ŝi aŭdis la infanojn *daŭrigadi* sian ĉantadon, « *tuvfa, tuvfa, …* », ĝis finfine iliaj krioj mallaŭtiĝis pro la distanco. Barbara demandis al si, kial la infanoj kruele farus ion tian, kaj kion signifas *tuvfa* ĉiuokaze ? Sed tiam ŝia korpo rememorigis ŝin pri la kialo, pro kiu ŝi fakte venis ĉi tien. Almenaŭ nun estas neniu ĉi tie, ŝi pensis, kaj ekserĉis lokon por tio, kion ŝi devis fari.

Poste ŝi turnis sin, intencante reiri hejmen, sed, kiam ŝi pensis pri sia patro kaj pri tiuj knabetoj, ŝi decidis, ke ŝi ne vere emas rapidi tien. Anstataŭe ŝi pensis, ke estus bone iri por rigardi unu el tiuj arboj *obaek*, kiu staras ne malproksime ĉe la alia malsupro de la monteto, kaj ŝi ekiris tien. Dum ŝi promenis, ŝi komencis pensi, ke la dezerto ne aspektas tiom morte, kiom ŝi antaŭe pensis, almenaŭ ne en tiuj ĉi montetoj. Estis kelkaj specoj de kaktoj, kelkaj vepraj arbustoj kaj tiu ĉi grandega *obaek*-arbo. Plej surprize, kiam ŝi fine alvenis al la arbo, ŝi ekvidis amikon. Lacerto sidis trankvile kaj sunumis sur la malplej alta branĉo. Ŝia unua penso, kiam ŝi vidis ĝin, estis tio, ke ĝi estas multe pli granda ol la lacertoj, kiujn ŝi konas de sia hejmo. Tiam frapis ŝin, kiom bela ĝi estas. Ĝia korpo estis brilflava, kiel suna tago, sed ĝia kapo estis *noktomez-blua*. Ĉiu lacerto, kiun ŝi iam ajn estis vidinta en sia vivo, estis aŭ verda aŭ bruna. Tiu ĉi besteto mirigis ŝin, kaj ŝi rigardis ĝin dum longa momento, kvazaŭ ĝi estus estaĵo magia. Ŝi pensis, ke eble ĝi ja estas.

La ĉeesto de la knabino ŝajne neniel ĝenis la lacerton. Ĝi turnis sian kapon unufoje por rigardi ŝin, sed ĝi ripozis tute kontenta sur sia branĉo. Ĝi ja grandis, eble je duonmetro, sed ĝi aspektis malpli grande en la giganta arbo. La arbo ŝajnis tre stranga al Barbara, kvazaŭ de alia mondo. Ĝia trunko estis nekredeble dika, kaj kvankam la arbo estis alta, ĝi neniel sufiĉe altis laŭ la indiko de la

trunko. Arbo tia devus turi al la ĉielo je pli ol tridek metroj, ŝi pensis, sed tiu ĉi apenaŭ altus je dek. Ĝi estis arba nano, giganta kaj dikega nano.

Tiam ŝi vidis ion alian, kio aspektis, kvazaŭ ĝi *devenus* de alia mondo. Malantaŭ la arbo estis ia kampo, kaj en ĝi estis aranĝitaj ie-tie pluraj altaj konusoj, laŭŝajne faritaj el mortaj plantoj. La kampo aspektis mistera al ŝi, kiel io, kion ŝi eble vidis iam en sonĝo. Frida tremeto suprenkuris laŭ ŝia spino. Dum pluraj minutoj ŝi staris tie apud la arbo, senmove, rigardante la strangajn konusojn. Ŝi serĉis por vidi, ĉu iu el la indiĝenoj estas tie. Ŝi vidis neniun. Ŝi rerigardis la plantkonusojn. Ili estis timigaj. Neniam ŝi estis vidinta ion tian. Ŝi sentis timon. Tamen la suno brilis varme super ŝi, kaj post mallonga tempo ŝia scivolo superis la timon. Malrapide ŝi ekpiediris el la montetoj kaj al la kampo.

Barbara iris rekte al la konuso, kiu plej proksimis la kamporandon. Ŝi vidis, ke ĝi ja estas farita el plantoj. Multaj longaj, brunmortaj trunketoj kaj longaj, brunaj, maldikaj folioj estis kune starigitaj, kliniĝantaj, unuj kontraŭ aliajn, kunligitaj iom sub la supro per helbruna ŝnureto. Ie-tie longa folio elkurbis el la konuso, donante al ĝi dornecan aspekton. La afero estis pli alta ol ŝi, pli alta ol iu ajn persono, kaj ĝi estis dika ĉe la bazo. Ŝi tuŝis la plantojn. Ili impresis seke, sed ŝajnis pli fortaj kaj malpli fragilaj, ol ŝi unue pensis, malpli mortaj, ol ili aspektis. Ŝi fortiris unu el la folioj kaj prenis ĝin en sian manon. Ŝi konstatis, ke la planto havas apartan odoron, sekan kaj mildan. La odoro memorigis ŝin pri io, sed ŝi ne povis rememori kion. Ŝi rigardis fikse la folion. Ĝi estis fleksebla kaj ne disiĝis, kiam ŝi ludetis kun ĝi en la mano. Ŝi tordetis ĝin de sub sia nazo por eligi la odoron alifoje.

Tiam Barbara aŭdis etan ridon. Konstatante, ke ŝi ne estas sola, ŝi tuj turniĝis kaj vidis du personojn : knabon kaj knabineton. Laŭ sia sono la rido venis de la knabineto. Barbara memoris ŝin. Ŝi estas tiu knabino, kiu sekvis nin al la domo, ŝi pensis.

Eta Anja ridis denove kaj ekkuris al Barbara. Repensante pri la knaboj, kiujn ŝi vidis ĉe la bazo de la montetaro, Barbara ekrigidiĝis unue, sed malstreĉiĝis iomete, kiam la knabineto alvenis al ŝi kaj prenis ŝian manon. Tiu ĉi ne diris la teruran vorton, *tuvfa*. Anstataŭe ŝi ekparolis rapide al Barbara en sia stranga lingvo, multe tro rapide. Mallaŭte ŝi parolis, sed ŝia voĉo estis dolĉa, kaj kvankam Barbara komprenis eĉ ne unu vorton, ŝi iel sentis, ke tiu ĉi knabineto volas amikiĝi. Unu-du-foje ŝi paŭzis kaj rigardis al Barbara per siaj

grandaj malhelbrunaj okuloj. Evidente ŝi atendis, ke la malpli juna knabino diru ion, sed kiam ŝi vidis, ke Barbara ne parolemas, ŝi feliĉe ekparolis denove.

Tiam Eta Anja retrorigardis al la knabo. Li ankoraŭ staris tie apud alia el la plantkonusoj, rigardante la du knabinojn. Eta Anja ridetis al li kaj tiretis la manon de Barbara, por ke ŝi sekvu ŝin tien, kie staris la knabo.

Barbara heziteme sekvis sian novan amikinon. Ŝi ne sciis, ĉu vere ŝi volas ekkoni iun alian. Tiuj ĉi estas strangaj homoj, ŝi pensis. Jen ili kriaĉas al mi, jen ili traktas min, kvazaŭ jam sian tutan vivon ili konas min. Mi eĉ ne konas ŝian nomon, kaj jam ŝajnas, ke ni estas amikinoj plej proksimaj.

La knabo malkvietigis ŝin. Unue li estis duonnuda, vestita nur per mallonga pantalono. Ŝajnis al ŝi, ke viroj ĉi tie evitas ĉemizojn, kvazaŭ kovri la bruston iel invitus al ili ian malsanon. Inaj tribanoj ŝajne ĉiam vestiĝis per brilkoloraj volvaĵoj kaj belaj ŝaloj, kiuj fakte tre plaĉis al ŝi. La viroj tamen, kaj la knaboj, ĉiuj paradumas tra la vilaĝo en preskaŭ nenio, kvazaŭ ili preparis sin por enlitiĝo.

Jes, tiu ĉi knabo maltrankviligis ŝin, sed pli ol la aliaj, kaj ŝi ne sciis kial. Li ne estas malbela, ŝi pensis, kvankam liaj haroj longas ĝis liaj ŝultroj, kaj polvo kovras liajn piedojn. Ĉu ili neniam aŭdis pri ŝuoj ? Pri sandaloj ? Pri ajna pied-kovrilo ?

Sed nek malpuraj piedoj nek manko de bona ĉemizo estis la kaŭzo de ŝia malkvieto. La veran kialon ŝia menso ne povis vidi. Ŝi jam vidis kelkajn plenkreskulojn de la Taŭakla kaj ankaŭ plurajn geknabetojn. Tiu ĉi knabo, kiun ŝi nun estis ekkononta, tamen, malsamis. Li aĝis dekkelkjare. Li same aĝis kiel ŝi, pli-malpli, kaj ial tiu fakto tre nervozigis ŝin.

Kiam la du knabinoj fine atingis lin, la knabo levis ambaŭ manojn montrante al ŝi la polmojn. Almenaŭ pri tio Barbara sciis, kaj ŝi faris la saman geston reciproke al li. Salutaj vortoj venis al ŝi malpli facile, sed ŝi pensis, ke ŝi devas almenaŭ provi. « *Tanala ma.* »

Barbara timis, ke ankaŭ li ekbabilus rapidege, kiel faris la knabineto, sed ŝajnis, ke li pli bone konstatis, ke lia lingvo estis fremda al ŝi. Li parolis klare kaj malrapide, por ke ŝi povu kompreni lin. Tio tamen helpis malmulte. Ŝi sciis, ke li salutis ŝin, sed liaj ceteraj vortoj havis nenian signifon por ŝiaj oreloj. Damna lingvo, ŝi pensis. Ŝi levis siajn ŝultrojn. « Mi ne komprenas vin. »

La knabo rigardis al la tero dum momento kaj poste fingroindikis al Barbara. « Krist-an-o ? » li

demandis heziteme. « *Ko* Krist-an-o *djen kena* ? »

« Ĉu Kristano vi diris ? » ŝi demandis al li anglalingve.

« *I'ii* ! Kristano. *Ko* Kristano *djen kena ?* »

Kia stranga demando, ŝi pensis al si. Mi ne demandas al li pri lia religio je la unua vorto. Ĉu tiom strangaj ili estas ĉiuj ? Aŭ ĉu Paĉjo jam predikis tiom, ke ili nun atendas Jesuon mem ?

« Kristano ? »

« Jes. » Ŝi ja sciis la vorton por jes. « Eh… *i'i*… mi supozas. Sed mia nomo estas Barbara. » Ŝi fingromontris sin mem. « Barbara. »

« Kristano Barbara ! » li rigardis al ŝi kaj relevis salutcele siajn polmojn. « Ĝarelo, » li diris malrapide, « *Ko Ĝarelo mido jadaa.* »

Aŭ ĉu eble li pensas, ke mia nomo estas Kristano ? Ho ve ! « Barbara ! » ŝi diris pli laŭte, por ke eble li komprenu. « Mia nomo estas Barbara ! Barbara Whitley. »

« Barbara, » li ripetis la nomon mallaŭte kaj ridetis al ŝi. « Ĝarelo », li diris metante sian manon sur sian bruston. Li metis la alian manon sur la kapon de la knabineto. « Anja. » La knabineto ridetis al ŝi kaj kapjesis.

Tiam ili nur rigardis sin dum pluraj momentoj. Barbara treege volis povi paroli kun ili, volis almenaŭ kapabli diri ion, ion ajn. La malkvieto, kiun ŝi sentis pri tiu ĉi knabo, kreskis en la longa silento, ĝis ŝi sentis, ke ŝi baldaŭ svenus ĝuste tie antaŭ ili, se iu ne dirus ion.

Ŝi neniam sentis sin tre aplomba kun knaboj, kiel estas kelkaj ŝiaj amikinoj, sed ĉiam antaŭe ŝi povis almenaŭ paroli kun ili. Li verŝajne pensos, ke mi estas stultulo, ŝi diris al si kaj ekpremis siajn pugnojn. La plantfolio kraketis milde en ŝia mano.

La planto ! Barbara pensis ekscite kaj tuj montris la folion al li. Ŝi paŭzis momente por kaŝi sian malkvieton. Ŝi ne volis aspekti tro anksia. « Kio estas tio ? » ŝi demandis al li. Tiam, rigardante lian senkomprenan vizaĝon, ŝi pensis, ke ŝi devas provi taŭakle, laŭeble, kaj ŝi heziteme kaj malrapide formis la vortojn, « *Makja ko ?* »

Ĝarelo ridetis al ŝi. Li ja estas plaĉa, Barbara pensis, eĉ kun la longaj haroj. Ne, ŝi repensis, aparte kun la longaj haroj. Nigre briletas lia hararo, kaj ĝi bele aspektas kun lia bruna haŭto kaj liaj nigraj okuloj.

« *Makoĉe* », Ĝarelo diris, kaj li milde tuŝis ŝian manon por preni la folion. La koro de Barbara komencis bati pli forte. Li streĉis la folion super sia

kapo.

Ĝarelo ekklarigis pri tiu ĉi planto, *makoĉe*, kaj pri tio, ke li ĵus plenumis unu el la plenkreskulaj rajtoj ĉi-sezone, kiam li estis, la unuan fojon, unu el tiuj, kiuj prilaboris la formadon de la maizuloj. Li fiere metis sian manon sur la konuson apud li kaj poste indikis sur siaj brakoj kaj kruroj kelkajn malgrandajn cikatrojn tie, kie la folioj estis tranĉintaj lian haŭton.

Barbara komprenis neniom de tio, kvankam ŝi konstatis, ke li provas paroli malrapide por ŝi. Foje Anja aldonis ion aŭ havis demandon por Ĝarelo, sed plejparte ŝi silentis kaj lasis la knabon paroli. Post la unuaj kelkaj vortoj Barbara ĉesis provi kompreni kaj nur aŭskultis lian voĉon. Dolĉa ĝi ŝajnis al ŝi, kiel melodia kanto, kaj, sen scii kial, ŝi sentis, ke larmoj ekestiĝas en ŝiaj okuloj. Barbara volis lerni lian lingvon, vere scipovi ĝin. Ŝi forviŝis la larmojn, antaŭ ol Ĝarelo povus vidi ilin.

Kiam Ĝarelo finis, li ridetis kaj redonis la folion al Barbara. Ŝi ridetis reciproke al li. « *Ĉa mala.* » Dankon.

Tiam li demandis ion al ŝi. Ŝi ne vere komprenis tion, kion li diris, sed ŝi sciis, ke la demando temas denove pri Kristanoj, ĉar ŝi rekonis almenaŭ tiun vorton.

Barbara suprenlevis la ŝultrojn denove. « Kio pri Kristanoj ? »

Ĝarelo svingetis la manon antaŭ si kaj Anja por montri, ke li parolas pri ili. « Taŭakla, » li diris. « *Ko Taŭakla migau kena.* » Tiam li fingromontris al Barbara. « Kristano. *Ko* Kristano *djen kena ?* »

Barbara ne sciis kion diri. Li pensas, ke mia popolo nomiĝas Kristano, ŝi pensis. Kiel mi klarigu pri tio ? Ho ve ! Eĉ anglalingve kion mi dirus ? Sed mi devas provi. « Nu, Kristano *kena* religio. » Ŝi paŭzis kaj rigardis lin, demandante ĉu li komprenus la ideon. Ŝi sciis, ke li ne komprenas la vorton *religio*, sed ŝi ne sciis kiel diri tion en la taŭakla.

Ĝarelo sulkis la frunton. Tiam li rigardis al Anja kaj ekdiris ion al ŝi. Nun li ne parolis malrapide por helpi al Barbara, kaj ŝi eksentis subite, kiom ŝi vere ne apartenas ĉi tie. La du Taŭaklanoj parolis inter si.

Ŝi provis kompreni iom de ilia konversacio, sed nur tri vortojn ŝi kaptis : Barbara, Kristano, kaj *tuvfa*. Ŝi volis morti ĝuste tie, kie ŝi staras. Ankaŭ tiuj ĉi du diras, ke mi estas *tuvfa*. Kio ĝi estas, damne ? Barbara sentis la larmojn *veni*. Tiuj ĉi ne estis feliĉaj larmoj, inspiritaj de dolĉa voĉo de bela knabo. Tiuj ĉi larmoj venis el la infero. Barbara

subite turniĝis kaj ekkuris el la kampo reen en la montetojn.

Dum ŝi kuris, ŝi aŭdis Ĝarelon kaj Anjan, vokantajn ŝian nomon. Ŝi nur kuris laŭeble pli rapide.

* * *

« Ĉu vi malsatas ? Ni manĝos post nelonge. »

« Bone, jes, dankon. Mi tre malsatas, » Ĝarelo diris al sia patrino. Nun ke li preskaŭ estis viro en la tribo kaj devis gvati la maizkampojn dum la tago, ŝajnis, ke li ĉiam revenas malsatege al la ĥato. Li rimarkis, ke lia nova respondeco tre plaĉas al li. Dum la seksezono la maizkampoj ĉiam ŝajnis magiaj al li. Tie li staris sole, meze de postrikolta kampo, kiu streĉiĝas tiom malproksimen. Li sentis sin kvazaŭ ia forta reĝo inter la maizuloj. *Lia* estis la devo protekti ilin, protekti siajn ulojn de la planta mondo. Ili estis donacoj de la gedioj, kaj nun la gedioj elektis lin por prizorgi la trezorojn de la tribo.

Li rigardis sian patrinon, dum ŝi preparis la vespermanĝon. Pasintjare, li pensis, mi estis infano, kaj mi helpus ŝin. Nun mi havis viran respondecon. Eble pro tio, la gedioj sendis la orharan knabinon al la maizkampo. « Panjo, » li demandis, « kion vi scias pri la novvenintoj. »

« Pri la Kristanoj ? Ne tre multe. Kial vi demandas ? »

« Bone, mi jam parolis kun Patro, sed mi iom konfuziĝas. Patro diris, ke ili volas, ke ni forgesu, ke ni estas Taŭaklaj. Sed mi ekkonis unu el ili hodiaŭ. Ŝi venis al la maizkampo. Ŝi agis, mi ne scias, iomete strange, sed mi ne certas, ĉu ŝi povus sorĉi min, por ke mi forgesu tion, kio mi estas. Iom ŝajnis, ke eble ŝi pensas, ke estas mi, kiu volas sorĉi ŝin. Ni parolis iomete, kaj tiam subite ŝi forkuris. Mi ne povus sorĉi ŝin, Panjo. Mi ne scius, kiel fari tion. Kaj ĉiuokaze mi ne volus sorĉi ŝin. Kial mi farus tion ? » Li rigardis sian patrinon. « Kion vi scias pri ili ? »

« Ho, Ĝarelo, la patro, sinjoro Whitley li nomiĝas, se mi bone memoras, venis dum la antaŭa pluvsezono, kiel vi jam scias. Vi estis for kun via patro por ĉasvojaĝo. Li estis tie ĉi dum eble kvin tagoj. Plejparte li parolis kun Keĉago. Mi vidis lin plurfoje, sed ne okazis, ke mi mem parolis kun li. Keĉago kaj la sinjoro pasigis longan tempon kune. Ĉiuj scivolis pri li. Multis onidiroj. Sed nur post kiam li foriris, ni aŭdis la tutan historion, pri kio temis lia vizito al nia vilaĝo. Komprenu, Ĝarelo, ili venas el fora kaj fremda lando. Ili havas malsamajn morojn, malsamajn gediojn. Keĉago diris, ke ili volas, ke ni lernu unu pri la alia, kaj ke

ni konu iliajn gediojn.

« Ili volas konstrui ian preĝejon. Ŝajnas, ke iliaj gedioj vivas ne en la Tero kaj la ĉielo, kiel la niaj, sed en ia domo, kiun konstruas la homoj por ili. Do, la sinjoro venis kun sia familio, ili konstruos la didomon, kaj, kiam ili finos ĝin, venos iliaj gedioj. Tiel ni povos ekkoni ilin. »

« Ĉu la preĝejo estos tiel, kiel la piramidoj, kiujn konstruis niaj prapatroj ? » Ĝarelo demandis iom ekscite, pensante, ke lia vilaĝo eble havus propran dipiramidon, kaj ke li mem estus tie por vidi ties konstruon.

« Mi ne certas, Ĝarelo. Vi scias, ke la tribo konstruis domon por la sinjoro kaj lia familio. Ĝi neniel piramidecas. Mi vere ne scias, kiel aspektos la domo por la gedioj. »

« Ĉu iliaj gedioj konos nian lingvon ? La knabino scipovis ĝin nur iomete, ne sufiĉe, por ke ni povu vere paroli. Se iliaj gedioj estas fremdaj al ni, verŝajne ili ankaŭ parolas fremdan lingvon, tutcerte la lingvon, kiun parolas la sinjoro kaj ties familio, ĉu ne, Panjo ? »

« Ho, mi vere ne scias, Ĝarelo. Vi parolu kun via patro, kiam li revenos. Li baldaŭ venos kun pli da fajroligno. Ne estos longe. Mi devas finkuiri la vespermanĝon. »

Ĝerenja reiris al sia kuirado. Ĝarelo rigardis ŝin, dum li pensis pri la stranga knabino. Ŝajnis, ke nun li havas eĉ pli da demandoj pri la novuloj ol antaŭe.

Ŝi estis preparanta nigran fazeolaĵon kun diktortiljoj, manĝon, kiu multe plaĉis al Ĝarelo. Ŝi kuiris la manĝon same, kiel ŝia propra patrino montris al ŝi, kiam Ĝerenja estis knabineto. Ŝi havis ĉion ĝuste ordigita sur la kuirplato, por ne malŝpari fajrolignon, kiu ofte malfacile troveblas en la dezerto. Meze de tiu kuirplato estis bruna argila poto, nigrigita ĉe la subo per brulmakuloj.

Ŝi pensis nun pri sia patrino. Ĝerenja ĉiam povis senti ŝian ĉeeston plej forte, kiam ŝi kuiris. Ŝia patrino amis kuiri, kaj ŝi amis la rilaton, kiun ŝia popolo havis kun nutraĵo. Ŝi amis la tradicion ĉirkaŭ ĝi. Dum ili laboris kune, ŝia patrino rakontis pri kukurbo aŭ pri fazeolo, pri tio, kial ili tiom gravas en iliaj vivoj kaj kial la gedioj, antaŭ longa tempo, decidis kundividi ĉi tiujn trezorojn de la Tero kun la Taŭakla.

Foje Ĝerenja pensis, ke ŝi ŝatus havi propran filinon, kiu povus adopti ĉi tiujn tradiciojn kaj labori, por ke ili daŭre vivu, kiel ŝia patrino estis instruinta al ŝi. Ŝi suprenrigardis rapide al Ĝarelo,

kaj tiam ŝi ridetis al si mem. Filoj havas aliajn pensojn. Filoj tro zorgas pri malsamaj homoj el aliaj landoj kaj pri iliaj fremdaj gedioj.

El la poto vapore venis la spica odoro de la fazeolaĵo. La aromo dancis en la aero kaj milde tiris Ĝarelon el siaj pensoj. Li profunde enspiris por flari ĝin kaj rekonstatis, ke fakte li ege malsatas. Li rigardis la diktortiljojn, kiuj rostiĝas ĉirkaŭ la poto. Ili estis faritaj *el* blanka maizo el la ĉefa maizkampo. Li rigardis sian patrinon, dum ŝi kirlis la fazeolojn per ligna kulero. « Do, kiam ni manĝos, Panjo ? »

« Tre baldaŭ. Ni atendas nur vian patron. »

La pensoj de Ĝarelo revenis al la stranga knabino. Tiom ŝi malsamas ol ni, li pensis. Niaj virinoj, niaj knabinoj surhavas taŭaklajn vestvolvaĵojn. Ili ĉiam vestiĝas tiel. Ĉi tiu knabino, Barbara, surhavis ĉemizon kaj eĉ mallongan pantalonon, kvazaŭ ŝi estus knabo. Strangas eĉ ŝia nomo : Barbara. Neniam mi aŭdis nomon tian. Sed ĝi ja diriĝas bele. Ĝi estas preskaŭ melodio, kvazaŭ kanto, kiun oni volus kanti al la gedioj. Barbara. Kaj ŝiaj haroj. Nigrajn harojn ni havas ĉiuj. La ŝiaj ne nigras, sed preskaŭ orkoloras. Tre bele, jes, sed strangegas. Bruno estas normala haŭtkoloro, sed ŝia haŭto havas koloron de sablo, ne la ruĝaj sabloj, kiujn ni havas tie ĉi, sed pli kiel la helaj sabloj, kiuj troviĝas diversloke en la montetaro. Jes, ŝia haŭto havas ekzakte la koloron de tiu sablo.

Kaj ŝiaj okuloj. Jen la plej frapa malsamaĵo, la okuloj. Ne brunaj estas ili, sed bluaj ! Tia profunda bluo devis esti la koloro de la okuloj de la ŝtonaj dioj, kiujn kreis niaj prapatroj por adori la gediojn de la Tero kaj la ĉielo. Mi vidis ilin *iufoje* en la antikva sankta loko. Nun ili ne plu havas juvelokulojn, sed patro diris, ke en la tempo de niaj prapatroj la ŝtonaj dioj havis okulojn el safiroj. Nuntempe la gedioj tro malofte uzas la ŝtonajn korpojn, kaj la okuloj ne plu estas tie.

Sed ĉi tiu knabino ne estas diino, li diris al si. Tamen, vere ŝi aspektas tiel. Ne, ĉar ŝi volas, ke ni ekkonu ŝiajn gediojn. « Kristanoj » ili nomiĝas, ĉu ? Kaj ŝajnas, ke ŝi volis, ke mi komprenu, ke ŝi mem ne estas Kristano. Bone, ŝajnas al mi, ke ŝi ŝanceliĝis. Ŝi diris, « jes, » sed tiam ŝi ŝajne diris « ne. » Eble ŝi estas filino de Kristanodio. Eble pro tio ŝi aspektas diece kun siaj safiraj okuloj.

Ĝarelo provis pensi pri ĉiu malsamecoj pri la knabino, kaj en sia menso rekreis bildon de ŝi. Stranga knabino, tiom bela tamen, kun nomo kiel dia kanto. Sed ŝi surhavis vestaĵojn de knabo. Li ne kutimis vidi ĉemizon, kiu kovras inan korpon.

Estis tre kurioze kaj iom ekscite, vidi mamajn ŝvelaĵojn kovritajn per vira vestaĵo. Mamojn ŝi havas ! li pensis subite. Ŝi jam atingis virinan aĝon, aŭ preskaŭ.

Ĉemo revenis post nelonge, kaj ĉio pretis por la vespermanĝo. Ĝarelo helpis sian patron stakigi ekstere la fajrolignon apud la ĥata enirejo. Dumtempe Ĝerenja metis maton sur la plankon meze de la ĥato. Tiam ŝi verŝis la fazeolaĵon en argilan bovlon kaj metis la diktortiljojn en korbon faritan el maizfolioj. Ĉion ĉi ŝi metis en la centron de la mato.

Dum ili manĝis Ĝarelo rakontis al sia patro pri la nova knabino. Ĉemo aŭskultis, sed ial li ŝajnis malparolema kaj diris nenion responde. Tiam Ĝarelo starigis amason da demandoj pri la nova familio, pri la tute nekutima aspekto de la knabino, pri tio, de kie ili estis venintaj, kaj pri la novaj gedioj Kristanoj.

« Ni scias malmulton pri ili, sed ni scias sufiĉe, » diris lia patro finfine per voĉo iom ĝenata. « Ili venis de fora lando, tre granda lando el la nordo. Ili venis por vivi en nia vilaĝo dum du jaroj. Iliaj moroj malsamas de la niaj. Ili ne konas niajn gediojn, sed havas proprajn, kaj ili intencas, ke ni adoru iliajn gediojn. Tial ili volas, ke ni helpu ilin konstrui preĝejon honore al iliaj gedioj, samkiel ni konstruis ilian domon, kie ili loĝas nun. Vi estu singarda, kiam vi estas kun ili. Vi scias, ke mi pensas, ke ili volas, ke ni forgesu tion, kio ni estas. »

Post tio la tri manĝis silente. Aŭdinte la malmildan tonon de liaj vortoj, Ĝarelo pensis, ke ne indus starigi pli da demandoj al sia patro. Tamen li daŭre pensis pri la stranga knabino, kiun li ĵus ekkonis. Li pensis pri tio, kion diris lia patro, kaj pri sia propra sperto kun la novveninto kaj provis igi, ke la du iel kongruu en lia menso. Dum li perdiĝis en siaj pensoj, estis aŭtomate, ke li fingre puŝis *kaveton* en sian diktortiljon kaj enkuleris la spican nigran fazeolaĵon. Sed, kiam li mordis ĝin, la akra gusto de kapsiko subite revekis lin al la manĝo antaŭ li. Panjo ĉiam preparas ĝin tiom bone, li pensis, tre akre. Mi scivolas, ĉu ankaŭ al Barbara plaĉas kapsiko.

Kutime post vespermanĝo la familio farus laboron en la ĥato, dum ili konversacius aŭ kantus kune. Ĉi -vespere tamen Ĉemo devis iri kune kun kelkaj tribanoj por paroli kun Imigko, la saĝulo. Ĝarelo sciis, ke temos pri la novvenintoj kaj pri iliaj gedioj. Li ege volis peti iri kun sia patro, sed pro ties zorgoplena mieno, li decidis, ke pli bonus silenti. Anstataŭe li helpis sian patrinon. Ili parolis

malmulte, tamen, dum ili laboris kune. Ĝerenja iom zorgis pri sia edzo, kaj ŝia filo daŭre *revadis* pri sia nova amikino.

Kiam alvenis la horo por enlitiĝi, Ĉemo ankoraŭ ne estis reveninta. Ĝarelo provis resti veka, por ke li povu aŭskulti novaĵojn de la kunveno. La dorma mondo estis vokanta al li, tamen, reprenanta lin milde en siajn dolĉajn manojn kaj alportanta lin al alia loko.

« El kio homoj estas faritaj, filo mia ? »

Ĝarelo rigardis malsupren. De tie, kie li estis, li povis vidi ne nur la kampon de blankmaizo, sed ankaŭ la ruĝmaizan kampon aliflanke de la montetaro. La tuta vilaĝo, lumigita per lunlumo, kuŝis sub li. Krom du lastatempaj ĉasvojaĝoj, tiu ĉi peco de tero estis lia tuta vivo. Nun tamen, de tie ĉi sur la piramidsupro, ĉio ŝajnis tiom eta. « El maizo, Panja Luno, » li respondis. « Vi kreis nin el maizo. »

« Kaj, se iun tagon iu diros al vi, ke iu patra dio formis vin el argilo kaj tiam blovis vivon en vin per sia spiro ? »

Li turniĝis por fronti ŝin. La ŝtonoj de la templo briletis, banataj per milda lumo. Ne eblis scii, ĉu la lumo venis de la arĝenta sfero en la sennuba ĉielo aŭ de la diino mem. Dolĉodora fumo venis de cindroj, kiuj blue ardis en siaj arĝentaj fajrujoj, ĉe ambaŭ flankoj de ŝtuparego, kiu longis malsupren al la Tero. La fumo malrapide kirliĝis en la aero dum sia vojaĝo al la malantaŭa muro, kie ĝin enspiris la tri formoj de la diino de la vivo. Ĝarelo sentis sin, kvazaŭ ĉiuj gedioj de Tero kaj ĉielo rigardus lin, kaj li pensis, ke eble pli taŭgus, se li genuiĝus. Kiam li faris tion, la ŝtona planko impresis malvarme al liaj kruroj. Li etendis brakon kaj tuŝis ĝin per sia mano. Ĝia malvarma malmoleco pensigis lin pri la argilaj homoj, pri kiuj demandis la diino.

« Mi ne certas, Panja Luno, ĉu tio havas sencon ? » li respondis finfine. « Se mi estus farita el argilo anstataŭ maizo, kial mi ne manĝas argilon ? Ĉu la Kristanaj gedioj faris siajn homojn el argilo ? »

« Ŝanĝoj venas, mia filo, ŝanĝoj kaj la danĝero, ke vi forgesos la saĝajn vortojn de la gedioj kaj de viaj prapatroj. »

« … ke ni forgesos, ke ni estas Taŭaklaj. » Ĝarelo ripetis la vortojn de sia patro.

« Vi eble rememoru, ke novaj ideoj ne nepre detruas. Sed ĉu vi kapablos samtempe teni la praan en unu mano, dum vi elstreĉas la alian por

la nova ? Nun estas iu, kiu venas por oferti al vi novan mondon. Ĉu vi povos akcepti ĝin sen perdi ĉi tiun mondon, kiu estas via sankta hejmo ? Rigardu la ĉielon. Ĉu vi povos ankoraŭ vidi, ke ĝi vivas kaj donas al vi vivon ? La Tero, kiu estas via sankta panjo, ĉu vi forgesos, ke ŝi amas vin kaj nutras vin ? Ĉu ŝi iĝos por vi nura stoko de iloj, kiujn vi povas uzi kaj misuzi laŭplaĉe ? Pensu, filo mia, ĉu la gedioj restos sanktaj en via koro ? Aŭ ĉu vi mortigos nin ? »

Ŝiaj vortoj frapis Ĝarelon. « Sed mi ne komprenas, Panja Kojoŝa. Vi estas la gedioj. Pro via amo vi kreis nin. Vi nutras nin kaj prizorgas nin. Ni estas la idoj de la Suno, viaj idoj. Ni amas vin, adoras vin. Kiajn vortojn vi diras al via filo ? Neniu Taŭaklano aŭdacus provi mortigi vin. Neniu povus eĉ pensi pri tio. »

La diino paŝis al la ekstera eĝo de la templa planko kaj sidiĝis ĉe la supran ŝtupon de la ŝtuparo, kiu gvidis malsupren sur la flanko de la piramido. La cindroj estigis bluajn flametojn momente, responde al ŝia ĉeesto, kaj nubeto de dolĉa fumo leviĝis en la aeron. Per mana gesto ŝi indikis al Ĝarelo, ke li leviĝu de sur siaj genuoj kaj venu por sidi apud ŝi.

Ĝarelo restariĝis malrapide. Li volis iri al la diino. Temis pri nur kelkaj paŝoj por atingi la ŝtuparon, sed li sentis sin svenema. Dum momento li nur staris tie. Lia kapo plenis je mensbildoj de mortaj gedioj, de senstela nokto kaj de mortanta Tero. Li subite konstatis, ke li estas ploranta laŭte. Li provis regi sin, konduti kiel triba viro anstataŭ timoplena bubo. Tiam li sentis la rigardon de Kojoŝa sur li, kaj li suprenlevis la kapon. En ŝiaj okuloj li vidis amon, kiu malakrigis la vortojn, kiujn li ĵus aŭdis de la diino de la Luno. « Vi estas la ponto, Ĝarelo, » ŝi diris al li.

Li iris al ŝi, sidiĝis apud ŝin. Ŝi tenis pokalon en sia mano. Belega ĝi estis, el brila arĝento kaj turkiso, kaj el ĝi venis la spica odoro de la sankta kakaa ŝaŭmakvo. Kojoŝa levis la pokalon al la Luno. « Trinku, Ĝarelo. Vi ĉiuj trinku el ĝi ; ĉar ĉi tio estas mia sango. Trinku ĝin memore pri mi. »



# Sukerkabano en Tririvero : la « kebekia inico » !



Ekzistas bela Kebekia tradicio : ĉiujare, kutime fine de marto, iri al sukerkabano : loko, kie oni kolektas kaj produktas acersiropon. Oni iras kun amikoj, familianoj, kolegoj por bone (kaj kaloriplene !) manĝi, babili, amuziĝi kaj festi la baldaŭan alvenon de printempo. Por lokanoj aŭ jam malnovaj enmigrantoj tio estas ĉiujara nepraĵo, kaj por relative novaj kebekianoj, kiel mi, tiu ĉi vizito kun esperantistoj estis la unua sperto kaj, iusence, inico per acersiropo. En aŭtentika malnova sukerkabano ni manĝis patkukojn, ŝinkon kaj plurajn aliajn bongustaĵojn kun acersiropo, marŝis sur profunda neĝo per « neĝoŝuoj » kaj faris bombonojn el acersiropo sur neĝo. Ni estis feliĉaj kaj dankemaj al Suzanne Roy el Tririvero, kiu organizis la aktivaĵon !

*Ĵenja Amis*







# Esperanto-renkontiĝoj

| | |
|---|---|
| 18-25-a de julio 2014 : 70-a IJK | Fortalezo, Brazilo |
| 26-a de julio — 2-a de aŭgusto 2014: UK | Bonaero, Argentino |
| 16-18-a de majo 2015: 12-a MEKARO | Toronto, Ontario |
| 25-a de Julio — 1-a de aŭgusto 2015 : 100-a UK | Lille, Francio |
| 21-23-a de majo 2016: 13-a MEKARO | Granby, Kebekio |

# Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

| | |
|---|---|
| Vendredo 12-a de septembro 2014, 18 h* | Resto Végo (sube) |
| Vendredo 26-a de septembro 2014, 18 h* | Itala manĝo en MEDO (alportu ion!) kaj jarkunsido de ESK |
| ARE: 10-13-a de oktobro 2014 | Silver Bay, New York |
| Vendredo 31-a de oktobro 2014, 19:30 h | MEDO |
| Vendredo 14-a de novembro 2014, 18 h* | Resto Végo (sube) |
| Vendredo 28-a de novembro 2014, 19:30 h | MEDO |
| Sabato 13-a de decembro 2014, 18 h* | Jarfina festo kaj LASTA kunveno en MEDO ! Alportu ion ! Anoncu vin al normandfleury@esperanto.qc.ca |

* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19:30 h. Por temaj vesperoj kun manĝoj vi povas alporti ion kaj veni je la 18 h aŭ vi povas veni simple por babili je la 19:30 h.

**Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien) :** 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).
**MEDO (Montreala Esperanto-Domo) :** 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la autoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko :** Yevgeniya Amis (riverego(ce) esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado :** Silvano Auclair, Francisko Lorrain kaj Joel Amis. **Estraranoj de ESK :** Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est premise, avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme :** Yevgeniya Amis (riverego(à) esperanto.qc.ca). **Correction :** Sylvain Auclair et François Lorrain et Joel Amis. **Administrateurs de la SQE :** Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2014.08.20**

**6358, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**


En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

***Visitez notre site web !***

www.esperanto.qc.ca

## Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi : www.pasportaservo.org. Vi povas ankaŭ kontakti Ĵenja-n Amis (yevgeniya.amis(ĉe) gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

